



La Civitanoj de la Mondo voĉdonas

La ĝermoj de perfortoj, kiujn estigas la mizero de la plimulto rilate al la abundo, kiun ĝuas malplimulto da terloĝantoj, la atmosferaj kaj akvaj poluadoj, la akaparo kaj la malŝparado de la fosiliaj energifontoj kaj de la maloftaj krudmaterialoj, la nesekureco de la loĝantaroj, la rapidega popolkreskado, la mona malordo, la plioftiĝo de perfortoj, de militoj kaj de fenomenoj pri sociaj ruiniĝoj...

problemas mondnivele kaj superas la kompetentecon de la naciŝtatoj.

Kontraŭ tiuj problemoj la internaciaj organizaĵoj mem montriĝas tro ofte nekapablaj konkretigi la plej bonajn intencojn, ĝenataj de la naciŝtataj aŭ privataj interesoj por defendi la universalan pacon kaj la aferon de la homaro.

Konfrontitaj al tiu nepoveco de la ŝtatoj kaj de ties internaciaj institucioj, ni, la Monda Popolo, devos organizi nin por aŭdigi nian voĉon, nian volon atingi la ellaboradon de pacema kaj civilizita mondo.

Ĝuste la Kongreso de la Popoloj havas tiun mision (vd. p.2). La Kongreso de la Popoloj estas nek Monda Parlamento nek Monda Konstitucia Asembleo, sed demokrata preparstadio. La Kongreso de la Popoloj ne eldonas universalajn leĝojn, sed preparas la vojon al la starigo de monda demokratio. Ĝi estas la aperanta voĉo de la Monda Popolo kune kaj kompletige kun la multeco de la organizaĵoj de la civila socio, kiu laboras en tiu sama senco.

Renovigitan Kongreson de la Popoloj

Kreita per sinsekvaj balotelektoj de 1969 ĝis 1998, la Kongreso de la Popoloj troviĝis konfrontitaj kun problemoj kaŭzigitaj de sia propra strukturo. Tial en 2003 la Plena Kunsido de Kongreso de la Popoloj profunde rearanĝis la ekzistan kaj funkcia manieron. Sekve vi estas alvokitaj por voĉdoni la renovigon de la unua triono de Kongreso de la Popoloj. **Vi devos elekti 15 novajn elektitajn Delegitojn por naujara mandato.**

La kandidatoj, kiuj estas prezentataj al vi en la sekvontaj paĝoj respondis al la alvoko al kandidatiĝo enpresita en pluraj gazetoj. Ĉiuj estas civitanoj de la mondo kaj laŭ la vidpunkto de la Balotelekta Kontrolkomisiono ĉiuj estas valoraj kandidatoj. Tamen ili havas tre diversajn devenojn, spertiĝojn, pensmanierojn kaj celojn. Al vi apartenas elekti el inter ili.

La « nova » Kongreso de la Popoloj aspektos tiel, kiel vi decidis, kaj havos la legitimecon kaj la efikecon, kiun vi donos al ĝi. Tial gravas, ke vi faru kaj esprimu vian elekton. Tio estas civitana devo ; tio estas neceseco por la progreso de la monda demokratio.

*La Balotelekta Kontrolkomisiono
de la Kongreso de la Popoloj
15an de junio 2007.*

Por kompletigaj informoj :

<http://www.recim.org/kdp/kdpopoloj.htm>

Mondcivitana Registrolibro, 66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

abc@recim.org

Kiel voĉdoni ?

Vi ricevis

En la granda blanka koverto :

⇒ tiun kajeron de la kandidatoj, kun 12 paĝoj, konsistantan el tiuj du klarigaj paĝoj kaj el 10 paĝoj por prezenti la kandidatojn al balotelektoj. Ili estas 20 kandidatoj. Ĉiu kandidato estas prezentita sur unu duona paĝo.

⇒ blankan koverton kun ordinara formato, nomitan « post-responda » validan en ĉiuj landoj de la mondo (Reglamento de la Universala Poŝta Unuiĝo).

⇒ verdan koverton kun malgranda formato.

⇒ balotilon entenantan la nomojn de la 20 kandidatoj.

Vi elektu ĝis 15 nomojn.

El inter la 20 prezentitaj kandidatoj, vi elektu maksimume 15.

T Vi transskribu viajn elektojn sur la balotilon per krucoj en la tiucele preparitajn kvadratetojn.

Vi sendu vian balotilon

1. Vi faldu la balotilon kaj enŝovu ĝin en la malgrandan verdan koverton ;
2. vi enŝovu tiun verdan koverton en la blankan « post-respondan » koverton ;
3. vi malgluu la protektan bendon de la post-responda koverto kaj vi fermu ĝin.
4. Vi enpoŝtigu tiun koverton *sen poŝtmarko*.

Notinde :

- a) la blankaj post-respondaj kovertoj estos malfermitaj nur la 22an de septembro 2007, dum la balotelekta voĉnombrado.
- b) por esti valida, via balotilo devas ricevi nur la krucojn, kiuj esprimas vian elekton. Maksimume : 15 krucoj. Neniu skribaĵo estos tolerata.
- c) La verda koverto devas enhavi nur la balotilon. Tamen kun la verda koverto, vi povas enŝovi en la postrespondan koverton leteron ĝis la maksimuma pezo de 20 gramoj.
- d) La literoj (de A ĝis T) estas markoj donitaj al la kandidatoj laŭ la dato de ricevo de ilia dosiero fare de la Balotelekta Kontrolkomisiono. Tiuj literoj estas destinitaj plisimpligi la voĉnombradon.
- e) La kontrakto de post-respondado, subskribita inter Mondcivitana Registrolibro kaj la franca Poŝto validos nur dum la balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj.

Ne atendu !

La ĉefaj taskoj, kiuj estis difinitaj ĉe la KONGRESO DE LA POPOLOJ estas jenaj :

- Starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.
- Proklami la neceson de publikaj tutmondaj institucioj kapablaj kontentigi tiujn bezonojn.
- Difini :
 1. sur kiuj terenoj estas necesa la interveno de publika tutmonda institucio ;
 2. kiuj transdonoj de kompetenteco profite al la publikaj tutmondaj institucioj, devos esti konsentitaj de la naci-ŝtatoj ;
 3. la procedurojn necesajn por la kreado de publikaj tutmondaj institucioj ;
 4. la strukturon de kreota tutmonda supernacia federacia aŭtoritato.
- Esprimi per mondaj deklaroj la opinion aŭ volon de la tutmonda popolo pri la eventoj koncernantaj la sorton de la homaro.
- Intervenii ĉe la registaroj aŭ la internaciaj instancoj pri la aktualaj mondproblemoj.
- Pristudi la raportojn de fakuloj pri la projektoj de tutmonda institucio kaj esprimi sian opinion.
- Prezenti antaŭprojekton de tutmonda federacia konstitucio al la naciaj registaroj kaj parlamentoj, kaj al la diversaj internaciaj instancoj.
- Ĉiel iniciati utile al la ekfunkciigo de demokrata monda parlamento, konsistanta ia. el Ĉambro de la tutmonda popolo.
- Celi la kunlaboradon kaj la kreadon de edukaj, informaj kaj kulturaj organismoj, favorantaj al ekkonsciigon pri universala solidareco.

Ĉe financoj :

La voĉdonado por la Kongreso de la Popoloj estas senpaga.

La voĉdonrajto estas submetita je neniu antaŭa devigo de kotizo aŭ de iu ajn kontribuo. Ĉiu voĉdonanto disponas por la resendo de sia balotilo « post-respondan » koverton sen afranko.

Tamen, oni scias tion, nenio estas reale senpaga : papero, kovertoj, presado, multnombra dissendado, kosto de la ricevitaj post-respondiloj, t.e. por tiu balotelektado suma elspezo de 10 000 €.

... kaj necesos rekomenci almenaŭ laŭ la sama buĝeto post tri jaroj, kaj post ses jaroj.

... ankaŭ necesos por la elektitoj funkcia buĝeto : kosto de la kunvenoj, de la protokoloj, de la necesaj intervenoj, de la pledado ĉe la ŝtatoj kaj internaciaj institucioj ...

Pli ol antaŭe Mondcivitana Registrolibro invitas ĉiun pagi memvolan jaran kontribuon ekvivalentan al duona tago de enspezoj, por ke niaj organizaĵoj povu efike plenumi siajn rolojn,

? Aŭ al via Registrocentro

? aŭ al : CITOYENS DU MONDE : CCP PARIS 2848 94 Y

IBAN : FR 46 30041 00001 0284894Y020 02 - Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR

? aŭ pere de **PayPal** ekde la ttt-ejo www.recim.org/cdm/

- Ni akceptas la ĉekojn en Eŭroj eldonitajn sur francaj bankoj.
- Por la aliaj landoj aŭ la aliaj monunuoj, necesas preferi la internacian poŝtan mandaton aŭ la interbankan ĝiron entenantan la ĉi-supran kodon **IBAN**, aŭ la pagon per **PayPal** ekde la ttt-ejo www.recim.org/cdm/.
- Ni akceptas la bankajn monbiletojn (konverteblaj aŭ ne) protektitajn per kolora aŭ karbona papero, kaj metitajn en la post-respondan koverton, sed tute ne en la verda koverto « Balotelektoj ».

La kreaĵoj de la Kongreso de la Popoloj

- **Ä Instituto por Tutmondismaj Studoj** (1977) IEM esplora kaj kultura organizo kun tutmondista perspektivo.
⇒ IEM-AIGS, rue Vert-Vinâve 60, BE 4041 VOTTEM (Belgio)
- **Ä Tutmondista Gazetagestejo** (1980) : AMIP . kiu regule aŭ okaze disdonas al la gazetagestejoj kaj amaskomunikiloj la informojn el la Kongreso de la Popoloj aŭ artikolon diskonigantan tutmondistan opinion pri aktualaĵo.
- **Ä Monda Solidareco kontraŭ la Malsato** (1982) : (MSM) kiu celas la starigon de tutmonda institucio de Solidareco, konkrete laborante kiel transnacia mutuala asocio, ĉeestanta en 32 landoj.
⇒ <http://www.globidar.org> - info@globidar.org
⇒ MSM/SMF, 1 ruelle Haute, FR 21120 GEMEAUX (Francio).
- **Ä Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj** (2004) / ASKOP Konsistanta el aliĝintaj organizaĵoj kaj el forumo da individuoj, ASKOP estas organizaĵo por partoprena demokratio rilata al la problemoj kun tutmonda intereso. <http://www.recim.org/ascop/>
- **Ä Jura Registro servo** (2006) (JRS) kreita por legalizi la statutojn, sindevontigojn kaj kontraktojn de transnaciaj organizaĵoj, kiuj deziras sin meti en la perspektivo de monda civila juro.
⇒ <http://www.recim.org/civil/>

Kunvenoj, laborgrupoj, deklarioj, sindeklaroj, kunlaborado kun ĉiuj organizaĵoj kaj kolektivoj da organizaĵoj zorgantaj pri la estonteco de la homaro kaj de la planedo, protektado de la minoritatoj, defendo de la homaj rajtoj, pledado ĉe la ŝtatoj, ĉe internaciaj institucioj, plifirmigo de monda juro, starigo de novaj institucioj...

Ĉion la Kongreso de la Popoloj faros kun vi kaj je via nomo. Multaj aferoj jam estas faritaj, sed restas ankoraŭ multe pli por fari.



Chris HAMER

Nask. en 1944
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 24.249
loĝanta en Coogee (Aŭstralio)
C.Hamer@unsw.edu.au

A

Resumo de la programo.

Mi estas konvinkita, ke estas bezonata monda parlamento por solvi la grandegajn mondajn problemojn kontraŭ kiuj la homaro stariĝas. Mi kondukis multajn kampanjojn kontraŭ la nukleaj armiloj kaj fondis la Aŭstralan Mondcivitanan Asocion por povi atingi miajn celojn.

Biografio

Mi estas fizikisto en la Universitato de Nova Sud-Kimrio en Aŭstralio. Dum multaj jaroj mi interesiĝis pri multaj problemoj koncernantaj la nuklean malarmadon kaj la mondan regecon kaj mi estis landa sekretario de organizaĵo nomita " Sciencistoj kontraŭ la nukleaj armiloj " (SANA) en Aŭstralio de 1989 ĝis 1992. Mi estis membro de la Mondfederaciista asocio. Mi ankaŭ estis akademia membro de la estraro de Asocio por Unuiĝo de la Demokratioj, 1999-2002 kaj de la Mondcivitana Asocio (Sanfrancisko, Usono) de 2001 ĝis 2002.

Mi iniciatis kurson de ĝenerala edukado en la Universitato de Nova Sud-Kimrio nomita "La nukleaj armiloj kaj la nova monda ordo", kaj mi estas la organizanto de tio ekde la komenco en 1988. Mi verkis kaj mem eldonis libron " A global Parliament : Principles of world Federation " ; (Oyester Bay Books, 1998). En 2007, mi iniciatis novan kurson de ĝenerala edukado pri " la principoj de monda federacio en la 21a jarcento ", kiu nun unuafoje okazas.

En 2004 mi fondis Mondcivitanan Asocion (Aŭstralio) kies prezidanto mi estas kaj mi laboras por la progreso de ĝiaj celoj varbante novajn membrojn kaj diskonigante nian mesaĝon al la

publiko.

Programo

Mi estas konvinkita, ke necesas monda parlamento por povi alporti solvojn al la grandegaj problemoj, al kiuj la homaro estas konfrontita kiel, ekzemple :

- la forigo de la amasdetruaj armiloj
- la batalo kontraŭ la plivarmiĝo de la planedo kaj la aliaj minacoj kontraŭ la medio
- la konservado de la homaj rajtoj
- la forigo de la epidemioj, de la malsatego kaj de la absoluta malriĉeco en la tria mondo.

Mi volas engaĝi min por la realigo de tiuj celoj kaj tial mi fondis la Aŭstralan Mondcivitanan Asocion.

Tiamaniere ni esperas :

- klerigi la civitanojn
- varbi pli da membroj
- fari trudojn sur la politikuloj
- kune labori kun la aliaj tutmondistaj organizaĵoj kiel la Kongreso de la Popoloj.

Pli aparte ni deziras fari trudojn por la disvolvado en nia regiono de la Komunumo de la Pacifikaj Insulojn partoprenante en la nuna forumo de la Pacifikaj Insuloj je monda nivelo. Mi ŝatus vidi NATO (Organizaĵo de la traktato de Norda Atlantiko) sin strukturi kiel komunumo por la ĝenerala sekureco de la demokrataj nacioj, kun novaj membroj kiel Japanio, Aŭstralio kaj Novzelando en Pacifiko, eventuale malfermita al ĉiuj organizitaj demokrataj nacioj por la gardado de la paco. Tio povus poste fariĝi la bazo de sistemo de monda regeco, kies starigon ni ĉiuj ŝatus.



Karl KPODO

Nask. en 1955
Mondcivitana karto n-ro 183125
loĝas en Accra (Ganao)

B

Depost mia enskribiĝo kiel civitano de la mondo la 30an de oktobro 1975, mi fariĝis pli konscia pri mia respondecoj al la homa komunumo. Mi profitis el la bultenoj eldonitaj de Mondcivitana Registrolibro, kiuj senĉese parolas pri monda demokratio, monda civitaneco kaj homaj rajtoj.

Notindas, ke mi gardis ĉiujn ĉi ideojn ĝis nun.

Freŝdate mi ricevis lokan statuson ĉe la Ganaa registaro, kiu nun ebligas al mi pli ol antaŭe disvastigi tiujn konojn profite al la Ganaaj popoloj kaj aliaj nacioj.

Mia freŝdata partopreno en la seminario de Bohicon en Benino de la 5a ĝis la 8a de oktobro 2006 estis por mi granda sukceso pro la informiĝo pri Unuiĝinta Naciaro kaj la estonteco de la homaro, irante tra Kongreso de la Popoloj kaj ASKOP.

Mi pensas, ke mia elektiĝo kiel delegito al la Kongreso de la Popoloj donos al mi gravan influon por agadi ĉe la grandaj registaraj instancoj por la sukceso de niaj projektoj.



Gerhard HIRSCHMANN

C

Nask. en 1939
Mondcivitana legitimkarto n-ro :102.591
loĝanta en Magdeburg (Germanio)
esperanto@email.de

Biografia resumo :

- 1993 Akcepto de celoj de mondciĵitaneco helpe de mondciĵitaninoj s-rinoj Charpentier kaj Grzyb.
- 2002 Decido pri konsciiga laboro por mondciĵitaneco, mondciĵitana registrado en Parizo kaj ĉe AWC.
- 2004 Starto de la teama laboro en la sekcio de AWC Germanio, centro Magdeburgo (MD).
- 2006 : Direktoro por Esperanto ĉe AWC, estrarano ĉe AWC Germanio, sekciestro de AWC Germanio, sekcio MD

Resumo de la programo.

Konsciante la plej gravajn celojn de la Mondciĵitanoj: kreado de daŭra paco kaj gardado de la vivo kaj de la trezoroj de la mondo por la sekvontaj generacioj, mi laboros por: La konsciigado de unuopuloj, fortigo kaj kooperado inter mondciĵitanaj agantoj, la publikigo de urĝe necesaj faroj, por informado de registaroj, parlamentoj, institucioj, organizoj kaj por parlamento de mondloĝantoj kun suverenaj kompetencoj por paco kaj medio.

Programo

Ĵus mi atingis la finon de la profesia laboro. Antaŭe mi estis dum 10 jaroj Vendodirektoro por nemoveblaĵoj, antaŭe vendosekciestro por telekomunikadaj sistemoj.

Laŭ profesio mi estas inĝeniero por telekomunikado. Mi vivas en Magdeburg, Germanio, depost 4 jaroj sole, la du infanoj estas "ekster domo" kaj vivas en Berlino kaj Bad Gastein, Aŭstrio.

Dum ĉirkaŭ 15 jaroj mi kunlaboris en asocio de entreprenistoj en Germanio kaj daŭrigos la laboron. Sed intertempe mia plej grava okupado estas la Mondciĵitaneco kaj Esperanto. Mi havas fortan volon pli forte agadi por tiuj temoj. Por plivastigi mian superrigardon kaj la eblecojn por internaciaj rilatoj, por influi kelkajn organizojn, parlamentanojn ktp. estus la membreco al la Kongreso de la Popoloj bona reputacio por la agado.

Mi sentas min en bona sanstato, havas multe da ideoj por la agadoj kaj estas preta, kunlabori en tiu ĉi Kongreso de la Popoloj.



Georges FEDERMANN

D

Nask. en 1955
Mondcivitana legitimkarto :
loĝanta en Strasburgo (Francio)

Biografia resumo

Mi naskiĝis judo kaj mi fariĝis kuracisto.

Mi dediĉas mian profesion aktivecon kiel sendependan psikiatran kuraciston, por favoriĝi dignan kaj daŭran integriĝon de la eksterlanduloj en neleĝa situacio, interalie de ĉiuj, kiuj estas viktimoj de psika traŭmo pro militaj kaj enlandaj konfliktoj, kiuj trafas la mondon (eksa Sovetio, Maŭritanio, Ĉadio, Ruando, Kameruno, Angolo, Bangladeŝo, Turkio, Irako, Sirio ...)

Resumo de la celdeklaro.

Ĉu vi deziras fari ion bonan por tiuj, kiujn morto renkontis. Geamikoj, lasu la mortintojn en paco kaj efektivecoj iliajn esperojn ».

La espero de Veroniko estas ĉiam adopti la « vidpunkton de la eksterlandulo », ĉar la morala kvalito de socio mezuriĝas pro tio.

Socio pritraktos post 10, 20, aŭ 30 jaroj, siajn proprajn idojn sammaniere kiel hodiaŭ ĝi pritraktas la eksterlandulojn .

Celdeklaro

Mi kandidatiĝas, ĉar mi defendas la universalecon de

la homa kondiĉo tra la praktiko de mia profesio kiel psikiatra kuracisto.

La konstruado de la socialo, de la politiko, de la solidareco kaj de la frateco estas malfacila kaj ofte problemhava lernado, kiun mispaŝo povas endanĝerigi.

Ankaŭ estas malfacile ne respondi al perforto per perforto, ĉu je individua ĉu je kolektiva nivelo. Malfacile sed nepre necese.

Mi naskiĝis judo kun ĉio, kion tio implicas pri kulturaj riĉecoj kaj pri eblecoj de komunuma kaj naciista envolvado (koncerne la defendon de la interesoj de Israelo.

Kaj mi kutime diras, ke mi fariĝis kuracisto kun la plene universalista dimensio, kiun tio trudas kaj instigas.

Doloro ne havas koloron kaj ignoras landlimon.

Mi dediĉas mian vivon por la akcepto de eksterlanduloj en neleĝa situacio, por favoriĝi ilian integriĝon en iun landon, Francion, pli kaj pli malgastigeman.

Mi faras tion kun despli da konvinko kaj fervoro depost kiam Veroniko mia kara edzino, estis murdita de iu el niaj eksaj kuracatoj, kiu subite frenezeĝis. Ŝia kaj nia familio estas la viktimoj de tiu dramo.



Joël LUGUERN

E

Nask. En 1946
Mondcivitana legitimkarto n-ro 47.562
Loĝanta en Issy les Moulineaux (Francio)

Biografio

Mi estas Civitano de la mondo ekde marto 1967, kaj agadanto en pluraj humanaj kaj ekologiaj organizaĵoj (Survival international, Eliri el Nukleo, ktp.)

Septembro 1969 : mi foriris al Sud-Vjetnamio kiel kooperanto, poste mi restis tie kiel sendependa ĵurnalisto ĝis 1973.

Respondecano ekde 1984 pri la fako « Sud-orienta Azio » en franca fondaĵo de humana helpo kaj de defendo de la homaj rajtoj (rekonita kiel publike utila), mi efektivigis multajn humanajn misiojn en tiu monda regiono, interalie en Kamboĝo kaj en Vjetnamio.

Redaktianto de la trimonata bulteno « Citoyens du Monde » (Civitanoj de la Mondo) ekde 1997

Sekretario de la franca Mondcivitana Registrocentro de junio 2002 ĝis majo 2006.

Repreno de tiu ofico en aprilo 2007.

Verkinto de pluraj libroj pri Vjetnamio

Deklaro de intencoj

Se mi estos elektita, mi petos la Kongreson de la Popoloj sin esprimi pri la naŭ jenaj temoj :

1. Esperanto deviga por la funkciuloj de UN, de UN-filioj (UNESCO, PNUD, ktp.) kaj la blukaskuloj.

2. Debato pri la kontraŭleĝaj internaciaj migradoj kaj pri la problemoj ligitaj al tiu monda fenomeno.
3. Kreado de Monda Aŭtoritato de Akvo, kiu respondecos pri ekspluatado, regado kaj dispartigo de akvo kaj de ĉiuj maraj KAJ submaraj riĉofontoj
4. Malpermeso de konstruado de ĉiu nova atomcentralo en la mondo tiom longe kiom la problemo de la atomaj rubaĵoj ne estos solvita. Malpermeso de subĉiela kultivado de ĉiuj genetike modifitaj plantoj.
5. Malpermeso de la « fiskaj paradizoj » (impostevitejoj).
6. Instalado de imposto sur la transporto de komfortovaroj, de luksovaroj kaj sur la internaciaj financaj transakcioj.
7. Instalado de kvotoj sur la naftaj produktoj, kalkulitaj proporcie laŭ la loĝantaroj. Instalado de « verda » ekoimposto okaze de kvota superpaso.
8. Instalado de grava imposto sur la flugbiletoj.
Tiu impostoj utilos por subteni evoluigon respektantan la planedon.
9. Debato pri la « griza ekologio », t.e. « la poluado pro la distancoj, la natur-grandeco, la proporcioj kaj la reduktiĝo de la mondo, kies motora elemento estas la rapideco ».



Rob WHEELER

F

Nask. en 1950
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 23.420

loĝanta en Fayetteville (Usono)

robineagle@worldcitizen.org kaj rob@wmgd.net

Resumo de la biografio

Mi batalas jam de 12 jaroj favore al la neceseco de monda demokrata kaj partoprena registaro, kaj de efika aplikado de la internacia juro. Mi aktive partoprenis en pluraj procezoj kaj klopodoj por reformi UN dum la lasta jardeko.

Resumo de la intencoj

Mi estas preta vigle subteni la klopodojn de Kongreso de la Popoloj por starigi Mondan Parlamenton, promulgi Mondan Konstitucion, disvolvi partoprean sistemon de monda registaro kaj krei ververan internacian juron.

Biografio

En 1994 mi partoprenis en la konferenco prepara al la Asembleo de Unuiĝintaj Popoloj. Sekve mi kunlaboris kun la Monda Asembleo de la Popoloj (Sanfrancisko). En 1998 mi fariĝis kunordiganto de la Reto de la Jarmila Asembleo de la Popoloj (MPAN). Mi partoprenis en pluraj komisionoj de UN pri daŭra evoluigo, financado de evoluigo, procezoj de paco kaj de malarmado, ktp. Tie mi reprezentis la Jarmilan Asembleon, la Mondcivitanan asocion de Sanfrancisko, la Internacian Instituton pri Daŭra Evoluigo, kaj plurajn aliajn organizaĵojn.

En 2002 mi kunordigis forumon pri la starigo de Monda Parlamento por la 21a jarcento, kun pli ol 400 partoprenantoj.

Mi partoprenis en la Mondaj Socialaj forumoj de Bombajo en

Hindio, kaj de Porto Allegre en Brazilo. Mi nun partoprenas en la plenuma komitato de WMGD (Monda Movado por Monda Demokratio).

Programo

Unue mi ŝatus aktive partopreni en la taskoj donitaj al la Kongreso de la Popoloj, kaj plej bone gvidi ĝin. Tio inkluzivus helpon por elvolvi la liston de la fundamentaj bezonoj de la tuta homaro - pri kio mi estas relative kutima dank'al mia laboro en la diversaj komisionoj de UN pri Daŭra Evoluigo, la loĝkondiĉoj, la civila socio. La elvolvado de tia listo estus ege utila por la disvolvado de la Monda Movado por Monda Demokratio kaj por la Kampanjo por Monda Agado por solvi la ĉefajn mondajn problemojn. Tiamaniere oni povus kunlabori en tiu kampo.

Mia intenco estus ankaŭ proklami la neceson de la kreado de supernaciaj institucioj.

Mi dezirus difini sur kiun terenon la interveno de supernacia aŭtoritato estus necesa ; kiel la transdono de la aŭtoritato estus akceptata de la naci-ŝtatoj ; kiel tiaj mondaj institucioj povus esti demokrate konsistigitaj ; mi ŝatus partopreni en la disvolvado de strategio por atingi interregistaran interkonsenton pri Monda Konstitucio subtenata de la loĝantaro kaj de la civila socio.

Plie, mi provizus konsilojn en la disvolvado de strategio por starigi novajn instituciojn de monda regeco kaj de internacia juro, bazitajn sur la multeco da proponoj kaj iniciatoj jam subtenataj de la Monda Movado por Monda Demokratio.



Marie-Louise DUBOIN

G

Nask. en 1931
Mondcivitana legitimarkto n-ro :169.134
loĝanta en Le Vesinet (Francio)
@ : ml.duboin()wanadoo.fr

Biografio

Mi estas ŝtata Doktorino pri fizikaj sciencoj kaj emerita universitata Profesoro.

Mia esploralaboro esence temis pri la studado de la aŭrala fiziko.

Samtempe kiam miaj sciencaj aktivecoj, mi plenumas ekde 1976 la regadon de monata bulteno pri socia-ekonomiaj priprenoj " La Grande Relève " " La Granda Anstataŭiĝo "

Tiu bulteno emas antaŭenpuŝi humanan ekonomion demokrate organizitan, sen limoj inter la popoloj, sen apartigoj, kaj sen ekskludo.

Laŭ tiu sama neperforta konduto por liberigi la popolojn el la diktaturo de la financo kaj el la perforto de la ekonomiaj militoj, instigitaj de tiu diktaturo, mi publikigis du verkojn kaj plurajn centojn da artikoloj kaj faris multajn publikajn prelegojn antaŭenpuŝantaj la evoluigon kaj la rekonon de la homaj rajtoj, kaj unuae la rajton havi sufiĉon por vivteni.

Programo

La mizero kreskis samtempe kiel la monda popersona produktado, kiu superas la vivtenajn bezonojn, dum pli ol 850 milionoj da homoj suferas pro misnutrado. Kaj la fosaĵo inter riĉuloj kaj malriĉuloj nur kreskas ĝis vertiĝo.

Urĝe necesas fondi mondan organizaĵon pri medio. Sed dum

tiuj lastaj jardekoj la du ĉefkonferencoj kiuj okazis en Rio kaj en Kĵoto pri la minacoj en tiu temo, estigis nur timemajn rezoluciojn, kaj kiujn la plej poluantaj landoj rifuzas apliki.

Same monda kunlaborado estas evidente necesa pro la elĉerpiĝo, kiun oni nur komencas antaŭsenti, de la nerenovigeblaj energioj. Sed nenio okazas. Kial ?

La civitanoj de la mondo devas rigardi fronte kion oni nomas la " Ŝuldon " de la tria mondo, kaj informiĝi pri la bazoj sur kiuj ĝi estas fondita, sciante ke nun la monaj fluoj de Sudo al Nordo estas pli grandaj ol tiuj, kiuj iras de la mone riĉaj al la malriĉaj landoj.

Ŝajnas al mi, ke ĉiu civitano de la mondo devas mem postuli, ke tiu liberala tutmondiĝo estu nun serioze kaj senpartie bilancita, kaj ke estu publike komparita tio, kion ĝi promesis, kun la realeco de tio, kio okazis : la instalado de monda diktaturo, tiu de financo, ĉar la internaciaj rilatoj ne estas bazitaj sur kunlaborado, sed sur konkurenco, sur kontraŭeco en senbremsa konkurso al la " profitodonaj " investoj.

Tial mi volus, ke ĉiuj civitanoj de la mondo, kiuj sin engaĝis pro la samaj humanaj kialoj kiel mi, kaj kiuj konscias, ke la principo de monda regeco valoras nur se temas pri vera demokratio, kune ekpripensu pri la rimedoj konstrui la fundamentojn de monda demokratio, inkluzive en la ekonomia-financa kampo. Kaj eĉ se tiu projekto, kiu devus forigi ĉian antaŭkonceptitan ideon, devas konduki ilin deziri anstataŭi la nunan monon, kiu estas ŝuldo-mono, per mono, kies nura funkcio estus ĝia aĉetopovo, do, kiu ne ebligus « produkti monon per mono ».



Liliane METZ-KRENCKER

H

Nask. en 1933
Mondcivitana legitimarkto n-ro : 024.191
loĝanta en Strasburgo (Francio)
lilianemk(aol.com)

Biografio

Emerita ginekologino. Ĝenerala Sekretariino de **Mondcivitana Registrolibro**, portempa Administrantino de **ASKOP**, vicprezidantino de la kunordiga komitato de « **Monda Movado por Monda Demokratio** », honora konsilantino por la Fako de Monda Unueco kaj de Pac-Edukado (**WUPED**) en Laknaŭo, Hindio, membro de la estraro de la aŭstrala **Mondcivitana Asocio**, membro de la plenuma komitato kaj kunfondinto de « **Mondaj Civitanoj por Paco** » en Melburno, Aŭstralio.

Kial mi estas kandidatino al Kongreso de la Popoloj ?

- Ĉar ĝi estas la nura monda organizaĵo konsistanta el reprezentantoj de la tera enloĝantaro sen distingo de rasoj, etnoj, religioj aŭ politikaj apartenoj, elektita per universala voĉdonado laŭ precizaj demokrataj reguloj.
- Ĉar tiu asembleo da Delegitoj restos funkcia ĝis kiam suverena monda supernacia aŭtoritato kun kiu ĝi povos eventuale kunfandiĝi, ekfunkcios.
- Ĉar mi kredas eble kaj necese paŝon post paŝo instali novan sistemon de monda regeco paralele kun la malnova.

Ĝenerale tiamaniere la aferoj funkcias, historio atestas pri tio : du sistemoj povas portempe kunekzisti kaj dum la malnova estas ankoraŭ funkcikapabla, la nova instaligās. Ni nun travivas tiun periodon kaj ni, Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, estas

alvokitaj plenumi tiun portempe paralelan funkcion.

Fakte la nacibaza regmaniero plenumita de homoj konvinkitaj, ke ili estas tie por certigi la unuaeco kaj la venkon de la nacia grupo al kiu ili apartanas, sen konsidero por la bonfarto kaj la pluvivo de la aliaj nacioj, fariĝas netolerebla.

Tiu finvenkista kaj egoista sinteno naskas nur malbonfaran konkurencon, suferon, militon kaj morton. Sen solvo de la konfliktoj en tuja estonteco la homaro estigos la detruon de la planedo.

Kiam mi estos delegitino al la Kongreso de la Popoloj,

- Mi deziras informi, komprenigi, klarigi al ĉiuj, civila socio kaj registaroj, kion ni povus konstrui kaj plenumi se ni kune mondscale agadus.
- Mi deziras fariĝi pac-instigantino kaj demonstri, ke alimaniere vivo eblas se ĝi estas la esprimo de la intereso kaj de la respekto de iuj por aliaj.
- Mi deziras starigi la inventaron de la ĉirkaŭantaj problemoj kaj trovi justajn solvojn favorajn al ĉiuj, rigardi aliulon ne kiel konkurencanton aŭ kiel malamikon sed kiel kunlaboranton en la peza laboro de rearanĝo kaj de restaŭrado de la planedo.
- Mi deziras labori por la starigo de mondaj institucioj je kies nivelo la reprezentantoj de la tuta tero, naciaj kaj sennaciaj, demokrate elektitaj, regos kaj protektos la teran heredaĵon, kiu estas konfidita al ili, kun honesteco, justeco, diligenteco, en la respekto de la diverseco kaj de rajtoj de ĉiuj, homoj kaj ne-homoj.



Heloisa PRIMAVERA

I

loĝanta en Florida (Argentino)
@ : heloisa(alliance21.org)

Biografio

Mi naskiĝis en Brazilo kaj vivas en Argentino ekde 1968. Mi studadis pri biologio en universitato de Sao Paulo, en Brazilo, kaj specialiĝis pri molekula kaj biologio kaj pri neŭrofiziologio en Francio, inter 1966-1968. Mia provo kunfandi mian profesion kun la socialan kaj politikan aktivemon kondukis min prezenti magistrecon pri socialaj sciencoj kaj verki tezon pri « Peronismo kaj sociala ŝanĝiĝo » ; mi estis gvidata de la profesoro Darcy Ribeiro, unu el la verkistoj, kies penso kontribuis al mia malfermiĝo al la granda patrujo de latina Ameriko. Poste mi kleriĝis pri lingva epistemologio kun la kreintoj de la skolo de Santiago : Humberto Mataruna, Francisco Varela kaj Fernando Flores. Kiel konsultdonisto mi laboras en kampo de organiza analizo, la funkciigo kaj la taksado de socialaj projektoj por publikaj kaj privataj organizaĵoj tiaj, kiaj PNUD, BID kaj CEPAL. Profesorino pri Magistrecio pri publika administrado ĉe la Fakultato de Ekonomiaj Sciencoj de la Universitato de Buenos Aires, mi kandidatas al doktoreco pro esplorado pri « la kompletigaj monunuoj kaj sociala ekonomio en Argentino : kontribuajfoj de konstruiva epistemologio ».

Engaĝiĝinte ekde 1996 en la antaŭenpuŝo de la interŝanĝaj retoj kun sociala monunuoj en Latina Ameriko kaj en la

mondo, mi gvidis inter 2001 - 2005 la laborgrupon pri Sociala Monunuoj de PSES - Fakoj de Solidara Socio-ekonomio de Alianco por Respondeca, Plurala kaj Solidara Mondo ; mi ankaŭ integriĝis ĝis 2005 en EGA (monda teamo de animato) de PSES, kiu regis 15 laborgrupojn kun internacia nivelo en la projekto de la Alianco (www.alliance21.org) En tiu ĉirkaŭo mi animis la lanĉon de laborgrupo pri Integritaj Evolu-Projektoj kaj Strategioj de Kolektiva Penso. Kun kunlaborantoj de ok landoj de la regiono, mi estis kunfondintino de RedLASES - Latin-Amerika Reto de Solidara Sociala-Ekonomia en 1999, kiu nun animas la Projekton COLIBRI, kies ĉefa celo estas la formado kaj la retigo de 1500 instigantoj de Integrita kaj Daŭra Evoluigo en Latina Ameriko, kunfinancita de FPH (Fondaĵo Charles Leopold Mayer por la Homa Progreso), en Svisio, la Fondaĵo por la Kvalito kaj la Partopreno kaj la Laboratorio por la Sociala Novigo, en Argentino. Mi aktive partoprenas en la movado por aktiva civitaneco antaŭenigita interalie de la Monda Sociala Forumo, ekde ties naskiĝo en 2001 kaj ĝis nun, ĉar mi estas engaĝita en la diskonigado de la ideoj pri aktiva sociala respondeco de la loĝantoj en ĉiuj aktivecoj, kiujn mi disvolvas en la akademia areo, kiel konsultdonistino aŭ aktivulino de la afero de daŭra sociala evoluigo. Tiuj aktivecoj estas sekveblaj en www.redlases.org.ar/colibri



Dauji GUPTA

J

Nask. en 1940
Mondcivitana legitimkartoj n-ro : 24.773
loĝanta en Laknaŭo (Lucknow) (Hindio)
@ : daujigupta@hotmail.com

Biografio

Naskiĝinta en riĉa kaj fama familio de Laknaŭo (hindio). Lia patro Sri GOPALJI estis fervora disĉiplo de Gandhi kaj defendanto de la justeco.

D-ro Dauji GUPTA studis komercon kaj juron en la Universitato de Laknaŭo poste li vizitadis la Universitaton de Vermont (usono).

Elektita kiel urbestro de Laknaŭo unuafoje en 1971 kaj triafoje en 1989 por kvinjara mandato. Li reprezentis Hindion en la Monda Konferenco de la urbestroj en Havajo en 1971 kaj fariĝis vicprezidanto de la konferenco.

Dum sia tuta vivo D-ro Dauji aliĝis al granda nombro de socialaj, kulturaj, akademijaj institucioj kun landa kaj internacia fameco.

Li estis gvidanto de partio de la Hinda registaro, la " Tutlanda Hinda Kongreso ", kaj membro de la ŝtata leĝodona Asembleo de Utar-Pradeŝo.

Li plurfoje partoprenis en sesioj de IEM (Instituto de Tutmondismaj Studoj) kaj en konferencoj kaj renkontiĝoj aranĝitaj de ASKOP (Konsulta Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj).

Profunde impresite de la Gandhia movado, influite de la kompatemo kaj la racia vido de Budho al la mondo, kaj inspirite pro la senĉesa batalo de Baba Saheb Ambedkar

kontraŭ la plago de la netuŝebleco kaj la malhomaj efikoj de la kasta sistemo, D-ro Dauji spontanee ekagadis en la kontraŭa kaŭzo por la emancipado de la kastoj Dalits kaj Backwards el ilia servuteco per siaj verkoj kaj politikaj aktivecoj.

Instigite de tiuj nerezisteblaj fortoj kaj profunde kortuŝite de alies grandaj suferoj kaj deprimoj, D-ro Gupta taskis sin per la nepra devo plenumi la nefinitan laboron de S-ro Baba Saheb Ambedkar, kaj tial ekverkis por senmaskigi la kaŝitajn pensojn kaj la malbonajn efikojn de la kreintoj de la kasta sistemo ĝenerala en Hindio.

D-ro Gupta parolas plurajn lingvojn kaj faris rimarkindan laboron por la disvastigo de Hindi, Urdu, Sanskrit kaj Pali tra la mondo.

Verkabunda poeto li publikigis en sep libroj antologion de siaj poemoj, kiuj estis ankaŭ tradukitaj en anglan.

Kiel politikisto, li defendas la neperforton kaj la mond-civitanecon por monda demokrata registaro.

Deklaro de intencoj

Mi estis asociita al tiu granda movado jam de pli ol 35 jaroj.

Mi fariĝis civitano de la mondo la 1an de januaro 1971, enskribite de S-ro Alexander France, kaj subskribite de S-ro Garry Davis dum mi estis urbestro de Laknaŭo, la ĉefurbo de Utar-Pradeŝo, plej granda Hinda ŝtato.

Mi ankaŭ plurfoje servis kiel ŝtata Senatano.

Ĉar mi havas administran kaj leĝofaran spertiĝon, mi pensas, ke mi povos konsiderinde servi la Kongreson de la Popoloj.



Rasmus TENBERGEN

K

Nask. en 1971
Mondcivitana legitimkarto n-ro :24784
loĝanta en Alfter (Germanio)
tenbergen()world-democracy.org

Biografio

D-ro Rasmus Tenbergen estas Plenuma Direktoro de IFLD (Instituto pro Klerigo de Gvidontoj) <http://www.ifld.de> kaj de Monda Parlamenta Eksperimento (<http://www.world-parliament.org/>). Li studadis politikan sciencojn kaj regadon en la libera Universitato de Berlin (Germanio) kaj en la Universitato de Harvard (Usono), fakiĝinte pri internaciaj traktadoj kaj rilatoj. De 1996 ĝis 1997 li estis kunelektita de la eksa germana kanceliero Helmut Kohl al la Centra Komitato de la reganta partio (CDU) en Germanio. De la jaro 2000 li disdonis kursojn de intertraktado kaj de gvideco en la universitatoj de Bonn kaj de Erfurt.

Deklaro de intencoj

Dum diskuto sur elektronika forumo de la Mondcivitanoj mi estis invitita prezenti mian kandidatecon al la Kongreso de la Popoloj. Mi fieras fari tion, ĉar Kongreso de la Popoloj havas grandegan kapablon : laŭ mia opinio ĝi povas funkcii kiel " provizora monda parlamento " je baza nivelo kaj tio estas laŭ mi la plej bona maniero per kiu necesus plani la kreadon de monda parlamento. Mi opinias, ke estas tre

taŭge, ebligi al la registritaj mond-civitanoj doni al aliaj mond-civitanoj la mandaton reprezenti ilin, kunordigi iliajn klopodojn kaj interagadi kun la cetera mondo. Similan klopodon mi provis apliki kadre de la projekto, kiun mi iniciatis en la jaro 2000 : la eksperimentado de monda parlamento (<http://www.world-parliament.org>), antaŭe konita kiel eksperimenta projekto de monda demokratio (<http://www.tdge.org>), " monda parlamento " funkcia sur Interreto.

Dua rimarkenda aspekto estas la kunlaborado inter la diversaj iniciatoj de internacia aŭ monda demokratio. De la jaro 2003 mi estas kun-iniciatinto de la klopodoj de formado de koalicio (vd <http://www.world-democracy.org>), kaj ankaŭ en tiu kampo la Kongreso de la Popoloj havas la necesan kapablon por faciligi la kunlaboradon dank'al la rajteco akirita per balotelektoj bazitaj sur la principo de unu homo, unu voĉo. Tio ne signifas, ke mi konsideras la Kongreson de la Popoloj kiel la sola kaj unika organizaĵo kapabla utili kiel ŝirmilo, sed ĝi certe povas helpi en la kunordigado de la diversaj konstruaj iniciatoj.

Se vi deziras ricevi pli da informoj, mi petas vin viziti mian tt-paĝon : <http://www.rasmus.tenbergen.de>

Rasmus Tenbergen



El Mostafa NAFATI

L

Nask. en 1957
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 184.344
loĝanta en Khourigba (Maroko)
nafatie2006@yahoo.fr

50j. Ŝtataneco : Marokano. Registrita kiel Civitano de la Mondo en 1996.

Laŭ profesio : kontisto.

Mia programo

Mi deziras starigi rilatojn kun la organizaĵoj kaj la laborgrupoj, kiuj laboras por la monda demokratio, laŭ ĉiuj monde gravaj temoj :

Milito, terorisme, homaj rajtoj, mizero de la plejmulto, malŝparado, poluado, paco, jutico, inter-popolaj rilatoj, inter-ŝtataj rilatoj, la internaciaj organizaĵoj, edukado, civitaneco aŭ civitismo, protektado de la oceanoj, protektado de atmosfero, evoluigo de la malriĉaj regionoj, senlaboreco, ekonomia progreso, lukto kontraŭ la malsato kaj la malsanoj.

La unua transnacia organo, la Kongreso de la Popoloj, difinas la vojon al monda konstitucia asembleo taskota per la starigo de monda juro kaj de institucioj kapablaj certigi la pluvivon de la biosfero kaj de la homaro.



Kenneth KOSTYO

M

Nask. en 1970

Mondcivitana legitimkarto n-ro :24783

loĝanta en Amsterdam (Nederlando)

kjkkostyo@hotmail.com

El biografio

Biblioteko de monda demokratio, Amsterdamo

Fondinto, Prezidanto Ĝenerala Direktoro kaj komerca sekretario de novembro 2004 ĝis nun, li laboris kun grupo aktivistoj kun la volo starigi leĝan enton por ricevi diversecon da projektoj de demokrataj movadoj por monda regeco entenanta la kreadon de demokrataj transnaciaj fondaĵoj, de lernejo kaj de biblioteko. Li taskis al si ĉiujn leĝajn problemojn kaj ankaŭ planis bazajn projektojn kaj financajn strategiojn, li pretigis laborplanojn, buĝetoj kaj la necesajn dokumentojn. Li starigis rilatojn kun grupoj de la civila socio, komencis la bazajn aktivecojn de financado. Li rolis kiel konsilanto por kelkaj grupoj de la civila socio pri la regproblemoj.

Nederlanda Monda Federaciista movado (WBFN) en Hago.

Membro de la Administra Konsilantaro, Adjunkta kasisto, delegita al la komunikado de majo 2006 ĝis nun. Il partoprenis en grupo por la evoluigo de la komunikado ĝis nun. Membro kaj helpanto de la Internacia sekretario de februaro 2002 ĝis nun.

Aktiva en senprofitcela transnacia organizaĵo, kiu antaŭenpuŝas demokration, justan regecon kaj homajn rajtojn je internacia nivelo, kio estas reprezentata de la nederlanda organizaĵo, membro de la movado de la mondaj federaciistoj. Li partoprenis en multaj internaciaj kunvenoj, kongresoj kaj konsilantaroj. Aktiva en multaj fakoj, li nun koncentriĝas sur la starigo de komunikadprogramo direktita al ekstero okaze de la baldaŭa sesdekjariĝo de WBFN. Ĝis estos centro de virtualaj fontoj vaste funkcia pri la tuta historio kaj la aktualeco de la movado por monda demokratio.

Deklaro de intencoj

Laŭ profesio mi estas internacia advokato. Dum la lastaj jaroj mi koncentriĝis nur sur la starigo de fontocentro kaj de reto por daŭra monda movado de demokratigo de la monda regeco.

Se mi estos elektita en la Kongreso de la Popoloj, mi uzos mian pozicion por antaŭenpuŝi mian laboron.

Nun mia ĉefa celo estas la konstruado de rekonita komunikad-centro por la tuta monda demokrata movado : TTT-ejo, bibliografio, forumo, kalendaro, ktp..



Diomaye SENE

N

Né en 1944

carte de Citoyen du Monde : 183.330

demeurant à Dakar (Sénégal)

sereres2005@yahoo.fr

Résumé biographique :

Après une carrière de fonctionnaire (armée, police, administration fiscale) Diomaye Sene se consacre à la préservation des cultures locales et à la pacification interethnique.

- Président de la fédération des associations culturelles Sérères du Sénégal
- membre fondateur de l'association culturelle Diolas Sérères
- Membre initiateur des convergences culturelles sénégalaises de Kaolack
- Membre fondateur du festival des origines à Fatick

Résumé de la déclaration d'intentions.

Notre travail consiste, si cela est possible avec l'aide du Congrès des Peuples, d'unir les ethnies de l'Afrique de l'Ouest en un seul peuple, de dialoguer pour s'acheminer vers la paix.

La diversité de mon cursus me fait savoir que c'est la diversité des points de vue qui fait la force de la

mondialisation culturelle, de la démocratie mondiale. Nous souhaitons qu'une entente universelle permette d'élaborer une constitution mondiale. Nous sommes tous citoyens du monde dans un élan réaliste et responsable. Je mets mon expérience à la disposition d'une entente culturelle mondiale. Je propose un contrat de progrès, de bien-être des hommes et de la nature, un succès d'espoir à tous et à toutes, dans la paix et dans la solidarité, la tolérance et la démocratie mondiale.



Bernard CHUZEVILLE

O

Nask. en 1948
Mondcivitana legitimkarto n-ro :169.278
loĝanta en Virigneux (Francio)
bchuzeville@aol.com

Biografia resumo :

Devenanta de Liono (Lyon) (Francio) mi ĉefe laboris ekster Francio kiel fakulo pri akvo, sub multaj statusoj (dungito, memlaboristo, ktp.). Ĉar longtempe mi vivis en multaj landoj, miaj devontigoj je familia, profesia, politika, socia kaj spirita niveloj konsistigas malfacile disigeblan tuton, ĉar profunde homaman kaj tutmondistan.

Deklaro de intencoj

Dum la homoj de mia generacio - tiu kiu naskiĝis meze de la antaŭa jarcento - preparas sin iom post iom emeritiĝi, mi sentas la profundan bezonon doni al mia profesia aktiveco pli malgrandan lokon tamen ne tute forlasante ĝin. Mia statuso kiel sendependa laboristo de nun ebligas al mi ekhavi pli grandan decidoliberon, ne submetante min je la trudo de ekonomia mondo obsedata pro antaŭenfuĝo tiel absurda kiel netolerebla.

Venis la tempo apliki mian hidraŭlikistan farscion el la fakula nivelo al pli politika nivelo. Fakte dum mi povis akiri dum trideko da jaroj la kompetentecojn kaj regi parton el la teknikoj kaj farscioj pri la utiligo kaj la regado de akvo en

multaj landoj, en Eŭropo, en Afriko kaj en Azio, mi estas pli kaj pli konvinkita, ke akvo ne estas varo kiel aliaj. Akvo ja ne estas varo sed tiu universala elemento, en senĉesa movado, kiu ebligas al ĉiu homo kaj al ĉiu estulo ekzisti sur tero.

La dek du jaroj, kiujn ni familie pasigis en Malio, en Kabo-Verda, Bukinio, konsciigis nin pri la neanstataŭebla valoro de akvo, kiam ĉi tiu fariĝas malabunda aŭ malfacile alirebla. Sed ankaŭ ili formis tre fortan tutmondisman vidpunkton kiel eble plej amplekse diskonigindan.

Kiel aktiva membro de pluraj asocioj direktitaj al akvo, tiaj " Hidraŭliko sen landlimoj ", " Vivanta akvo ", " Akvo estas la ponto ", mi partoprenis en diversaj agadoj je loka nivelo. Ne forlasante ĉiujn devontigojn, mi pensas, ke nun mi devas pli eksplicite partopreni en agadoj iniciatitaj je monda nivelo.

Ĉar mi havis la ŝancon plenumi dum kelkaj jaroj la oficon de elektito en malgranda urbo kun forta kresko, mi konscias pri la malfacilaĵoj, kontraŭ kiuj devas fronti la lokaj komunumoj. Tial mi deziras kuraĝigi ĉefe kvalitan kreskon, ne nur en la tiel nomite evoluintaj landoj, sed ankaŭ kaj eble ĉefe en la aliaj landoj. Alirebleco por ĉiuj al kvalita kaj sufiĉe kvanta akvo enestas inter la prioritatoj plenumotaj eĉ se foje tio estas malfacila.



Leo REBELLO

P

Nask. en 1950
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 023.750
loĝanta en Mumbay (Hindio)
drleorebello@gmail.com

Biografio

D-ro Leo Rebello estas la direktoro de centro pri natura sano en Bombajo. Li faris milojn da prelegoj en 63 landoj, kaj interalie intervenojn ĉe MOS, ONUSIDA, UNESKO, PUND (programo de Unuiĝinta Naciario por Disvolviĝo), PUNM (programo de Unuiĝinta Naciario por Medio), kaj verkis 30 librojn, kaj estis intervjuita de mondaj amaskomunikiloj.

- Registrita kiel Mondcivitano en 1992
- Prezidanto de la Asocio por Mondaj Konstitucio kaj Parlamento ekde 2000 .
- Prezidanto de 4M : Monda Movado de Tutmondistaj Aktivuloj
- Membro de la Plenuma Estraro de " international Teacher" (Internacia instruisto)
- Vicprezidanto de la Internacia Asocio de la Edukistoj por la Monda Paco
- Pac-ambasadoro de la organizaĵo " Award Winner " ekde Januaro 2004.

Deklaro de intencoj

Ĉar mi kredas en monda parlamento kiel stariĝo kontraŭ la novkonservatista koncepto de " unuspeca mondo ", kaj ĉar mi ĉiam kaj konstante aktiviĝis por tiu celo, mi dezirus elektiĝi al la Kongreso de la Popoloj kaj labori por la realigo de tiu ideo, kiun mi karesas jam delonge.



Ulisses RIEDEL

Q

Nask. en 1933
Mondcivitana legitimkarto n-ro :104.323
loĝanta en Brazilia
organizacao()forumespiritualmundial.org.br

Biografio

Advokato je Laboraj Kaŭzoj, Prezidanto de Unio Planeda kaj Direktoro de Societo Bona Espero kaj de Teozofia Instituto de Braziljo, Direktoro pri Disvastigo de Teozofia Societo en Brazilo, Honora Civitano de Braziljo, Membro de Konsilantaro de Unipaz, Diplomito kiel Senatano de Brazila Respubliko.

Programo

Kiel prezidanto de N.R.O. Unio Planeda (www.uniaoplanetaria.org.br), mi deklaras mian intencon daŭrigi kaj ampleksigi la laboron de tiu Organizo, kies principoj estas mondcivitaneco, egalrajteco, solidareco, lingva demokratia komunikilo por ĉiuj, frateco. Nuntempe, ni elsendas televidprogramojn per 62 asociaj televidkanaloj al pli ol 20 brazilaj urboj. Tiuj programoj enestas jenajn televidseriojn: Mondpaca Konstruado, Etiko kaj Daŭrigebleco, Serĉe de Memkonado, Jogo kaj Longdaŭra Vivo, Esperanto: Ilo de Solidara Tutmondiĝo k.s. La celo estas plialtigi la nivelon de tiu amaskomunikilo, per paradigmoŝanĝo. Unio Planeda defendas, ke ni devas helpi la ŝanĝon de hom-valoroj.



Vincent PEINGNEZ

R

Nask. en 1965
Mondcivitana legitimkarto : 179.318
loĝanta en Marcq-en-Baroeul (59, Francio)
pv5()libertysurf.fr

Résumé biographique :

Mondcivitano enregistrita en 1989, membro de ACAT (Kristana asocio kontraux torturo), ATTAC, Pax-Christi, Mondaj metiistoj, dumviva membro de Esperanto-Francio, de UEA, kaj loka kaj regiona membro de Esperanto-centro. Sekretario de Norda-okcidenta Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

Deklaro de intencoj

- Plej malfermi la debaton pri la politiko de lingvo-instruado en la mondo, cxar komuna monda lingvo estas nepre necesa por starigi mondan regecon kompreneblan de ĉiuj.
- Antaŭenpuŝi la kreadon de monda aŭtoritato pri medio, kiu konsideros la limojn de niaj planedaj riĉofontoj.
- Konduki mondan pripenson pri nia homa destino

por rekoni, ke kelkaj realecoj superas nin.

- Ebligi gravan malarmadon en niaj landoj.
- Plifaciligi interreligian dialogon kaj filozofiajn interŝanĝojn de vidpunktoj.
- Certigi minimuman nutradon por ĉiuj.
- Konsciigi la civitanojn pri la generaj problemoj pro la prognozoj de necesa malkresko de la loĝantaro responde al la planedaj limoj.
- Defendi la homajn rajtojn.
- Kreskigi la kuracajn kaj aliajn zorgojn al la tuta monda loĝantaro.
- Plisendependigi la informretojn kontraŭ la ekonomiaj kaj politikaj trudoj.



Yves ANGELLOZ

S

Nask. en 1945
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 171876
loĝanta en Bellegarde sur Valserine (Francio)
angelloz()club-internet.fr

Biografia resumo

Svisa kaj franca ŝtatanecoj. Civitano de la Mondo de 1979. Fondinto de la Mondaj Pacludoj. Verkisto, aŭtoro-komponisto, interpretisto.

En 1983 li fondis la unuajn Mondajn Pacludojn, kiuj estis organizitaj en diversaj landoj. La lastaj en Dubaï kunigis 28.000 partoprenantojn el 75 nacioj.

Deklaro de intencoj

- Lanĉi grandan konkurson da ideoj kaj pripensoj « *Kiel organizi la morgaŭan mondon ?* »

Ā Alvoki ĉiujn NRO, ĉiujn pensulojn kaj agantojn de tiu komenciĝanta jarcento, fondintojn, prezidantojn de homcelajn asociojn, membroj de prens-klubo, Nobel-premiitojn, artistojn, verkistojn, scienculojn, poetojn, ĵurnalistojn, sportulojn, ĉiujn kiuj havas profundan koncepton de la komuna bono por subteni, kunlabori kaj partopreni en granda internacia konkurso da ideoj kaj pripensoj pri nova organizmaniero de la

planedo, malfermita al ĉiuj homoj de la mondo, titolita « *Organizita mondo* ».

Ā Estos donita al la partoprenantoj, kiel sugesto kaj pripensa instigilo, la eventuala konsistigo de Asembleo de la Popoloj, kiu estus, fronte kaj ĉe UN – monda Senato – la Asembleo de la Mondaj Deputitoj.

Fakte, dum nun ekzistas sur internacia scenejo, rajto de la ŝtatoj esprimiĝi pri la problemoj, kiuj koncernas la tutan homaron kaj kiuj superas la kompetentecon de la nacioj, male ne ekzistas institucio, kiu ebligus al la popoloj de la mondo esti rekte kaj demokrate reprezentataj sur tiu sama internacia scenejo.

- Subteni Esperanton, kiel ilon de internacia komunikado : konkreta eksperimento povus esti proponita okaze de la Mondaj Pacludoj.
- Gastigi en « La Gauthière » la sidejon de la Kongreso de la Popoloj.

« La Gauthière », internacia centro de la Mondaj Pacludoj povus ankaŭ fariĝi la sidejo de la Kongreso de la Popoloj. Ĝi situas je 30 km de Ĝenevo, internacia urbo.



Wolfgang FISCHER

T

24785 Nask. en 1951
Mondcivitana legitimkarto n-ro :24785
loĝanta en Munkeno (Germanio)

@ : global()emanzipationhumanum.de

Biografia resumo :

- Kuracisto
- Plurfoje restadis en Afganio kaj en Peruo en indiĝenaj loĝantaroj.
- Kondukis laborojn pri la homa identeco kaj la elvolviĝo de la personeco en perforteca mondo.

<http://uuhome.de/global/english/index.html#pers>

Deklaro de intencoj

La ĉefa ideo de mia kandidateco estas, ke la evoluigo kaj la mastrumo de la problemo de la malriĉeco de la indiĝenaj popoloj, de la nacioj kaj de la mondo estos ebla nur si la landoj kaj la homaro evoluigas kulturan kaj humanan identecon, procezon rilatan kun la ĝenerala plibonigo de la situacio de la indiĝenaj popoloj, de la rekiro de sia fiereco kaj konsekvence de sia memfido. Por ke tiu procezo fariĝu reala, necesas organizaĵo kaj kunordigado de la indiĝenaj popoloj kaj de ĉiuj homoj, kiuj rezistas kontraŭ la terglobismo, kapablaj certigi formalan partoprenon, organon kaj sendependan al la demokrataj strukturoj de ĉiu ajn naciŝtato kaj trans la naciaj landlimoj. La unua stadio de la

evoluigo de tia metodo konsistas en la rekiro, trans ĉia ideologio, de minimumo de indiĝena kaj homa konsciigo, kiu povus utili kiel scienca, praktika kaj politika tereno al la indiĝenaj popoloj same kiel al ĉiuj, kiuj kontraŭstaras ghin.

Hodiaŭ la terglobismo de la entreprenoj kun la rasismo de la blanka kaj riĉa homo kontraŭ homaro ĉiam pli mizera, estas konsekvenco de la antaŭaj mondaj kaj mensaj koloniigoj de la indiĝenaj popoloj ekde miloj da jaroj.

Ĉia hodiaŭa rasismo baziĝas sur tiu realeco, kiu en la patriarkaj, unudirektaj kaj vertikalaj sistemoj perforte funkcias laŭ normiga maniero.

Necesas redirektiĝo al la fundamenta principo de la individua identeco en la homa diverseco. Necesas la rekono de la saĝo kaj de la rezistado de la indiĝenaj popoloj. Necesas komuna klopodo, kunordigita kaj internacia al klara emancipiĝo de la homaro : la disvolviĝo de globa kaj paciga konscienco.

Tio estus, en la historio, projekto reale noviga, fundamente liberiga kaj kontraŭa al ĉia ideologia projekto. Tio estus projekto por la servo de homo, sendependa de ĉiu ideologio. Projekto, kiu celas nur plenumi la defiojn de la realeco de ĉiu momento de la vivo je ĉiuj niveloj de la socio, de la vivo.